


Eŭropa Bulteno

Aprilo-Majo 2020, Numero 202

KION FARI NUN?



Unue mi resumas la situacion nuntempe por povi evoluigi pluan evoluon de la mondo kaj kiajn kondiĉojn tio prezentas por la E-movado.

La nuna politika situacio dependas antaŭ ĉio de usona dogmo ke ili devas reteni avantaĝojn sur la monda merkato kiujn ili atingis dank' al posedo de la plej potenca armeo kaj rajto produkti petrodolarojn en senlimaj kvantoj. Se ili rezignus pri tiuj du nemerititaj avantaĝoj, nur tiam ili estus egalkonkurencaj sur la merkato ankaŭ kun kelkaj aliaj ekonomiaj potenculoj kiel Ĉinio, Rusio kaj EU.

Kvankam ne plu estas kaŭzo por ideologia batalo kiu karakterizis la antaŭan periodon de malvarma milito, Usono nun pro sia dogmo plu havi absolutan monopolon sur la merkato ne

volas cedi pri sia politiko ebligi detruon de la ekologia stato de la mondo. Se ili decidus forigi siajn kostojn por la armigado, aŭ almenaŭ esence malfortigi ĝin, la mono kiun ili ŝparus estus sufiĉa por solvi la kronvirusan danĝeron kaj por solvi la danĝeron ke la homaro mem detruos sin per iu nuklea milito. Pro tio en la estonto ni plu devos vivi kun tiuj du danĝeroj – la malsanproblemo kaj la nuklea milito.

Tio, kopreneble, difinos la eblecojn por la internacia movado de esperantistoj. Verŝajne oni ne povos kiel en la ĝisnuna periodo agi internacie kiel publika socia movado kiu povos atentigi pri si en internacia politiko, aparte en EU. Do, restas nur la zorgo pri si mem. Pri evoluigo de la E-movado mem kaj ties kulturo kaj produktoj bezonataj kiel lernolibroj. Klaras ke la internaciaj kunvenoj, kiuj gravegis ĝis nun por evoluigi la parolantaron nepre necesan, praktike reduktiĝos al minimumo sed oni devos evoluigi alispecan renkontiĝadon per elektronikaj rimedoj. Tio kaŭzos kompletan ŝanĝon de la nunaj movadaj strukturoj. Iom post iom malaperos la klasikaj organizaĵoj kiel UEA, EEU kaj aliaj baziĝantaj je lokaj societoj kaj kotizoj. Tion anstataŭos profesiaj organizaĵoj kaj societoj funciantaj en la reto baze de membroidoj. Tiusence ankaŭ EEU devos pensi pri alistrukturiĝo kiu devas antaŭvidi financadon per fondusoj kaj projektoj kio nepre devas havi bone funkciantan profesion sekretarion aŭ almenaŭ sekretarion. La ĝisnuna EEU maksimume bone evoluis por doni bazon por plua evoluo. Oni daŭrigu tiel rilate al eŭropunia politikistaro kaj akceptigo de E-projektoj por esti financataj de EU. Oni do havas bonan bazon por pluevolui, sed necesas aparte atenti pri la fakto ke nun pro la novaj cirkonstancoj EU-fondaĵoj tre limigos kvanton da mono por edukado.

Zlatko Tišljarić

MEDICINA KONGRESO OKAZOS

Ni informas vin, ke malgraŭ la koronavirus-epidemia, ni organizos la 21an IMEK, ĉi-jare post 4 jaroj denove.

Ni adaptiĝos al la cirkonstancoj unuflanke en la organizo, do ĝi estos en la interreto uzante ZOOM-aplikaĵon, kaj aliflanke la ĉefa temo estos la Koronavirusepidemia. Ni bonvenigas ĉiujn niajn karajn esperantistajn gekonatulojn al interesaj prelegoj. Ne nur kuracistoj, sed iuj ajn eblas partopreni.

Esperantistoj el la tuta mondo povas ĉeesti la kongreson inter la 17a kaj 18a de julio 2020 (vendredon kaj sabaton). Alie, vi povas ricevi detalajn kaj ĝisdatigitajn informojn ĉe la retpoŝta adreso de LKK: info.21aIMEK@gmail.com.

Internacia Medicina Esperanto-Kongreso

SOMERA ESPERANTO-STUDADO 2020 - VIRTUALE KAJ TUTMONDE



Ĉi-jare E@I preparas por vi specialan, unikan virtualan Esperanto-lernejon!

La pandemiaj obstakloj ne permesas, ke SES 2020 okazu fizike en Ĉeĥio, kiel antaŭe planite. Sed ĝi tamen ja okazos - virtuale kaj tutmonde! Laŭplane tiu-ĉi SES okazos 18.-26.7.2020, kaj la ĉefa instruado okazos dum la du semajnfinoj (kun aldona libervola programo inter ili, ĉefe posttagmeze/vespere laŭ la mezeŭropa tempozone).

Dum SES okazos ne nur diversnivelaĵoj kursoj de Esperanto, sed ankaŭ kurso pri Esperanto-literaturo kaj kulturo kaj plia kurso pri tradukado de kaj al Esperanto. La kursojn gvidos spertaj instruistoj. Pliaj detaloj pri ili: <https://ses.ikso.net/2020/eo/instruado/> Kurson pri la EO-literaturo gvidos sperta Oleg (Oĉjo) Ĉajka el Rusio, la kurson pri tradukado fama verkisto/tradukisto/bardo: Mikaelo Bronŝtejn. Krom tio la partoprenantojn atendas diversaj prelegoj, diskutoj, kvizoj, koncertoj kaj multe pli.

Kompreneble, neniuj ĝojas pri la kronvira situacio en la mondo - tamen, aliflanke, pere de tia-ĉi "virtuala SES" nian retan Esperanto-lernejon povos partopreni eĉ pli da homoj ol kutime, de ie ajn en la mondo. Pluraj homoj ja ne havas eblon partopreni la fizikan aranĝon - ĉu pro tro longa vojaĝo, ĉu pro financoj, ĉu pro tempomanko, ĉu pro iuj aliaj kialoj. Nun eblas ekhavi sperton de internacia aranĝo kaj samtempe resti hejme. Aldone oni ŝparas kaj monon - la kosto de la reta SES estas signife malpli alta, kaj tempon - ne necesas vojaĝi al la SES-ejo kaj reen. Tiel la aranĝo estas ankaŭ pli ekologia! :)

Aliĝu al la unua virtuala tutmonda SES pere de aliĝilo en la retpaĝo - <https://ses.ikso.net/2020/eo/aligxilo/>! Ĉu vi havas amikon aŭ konaton, kiu interesiĝus pri la aranĝo? Eble iu de via loka Esperanto-klubo volus partopreni? Rekomendu ankaŭ al ili la ĉeeston! Ja progreson en la lingvo kaj ties instruadon eblas aranĝi rete, kaj poste jam oni povos kun pli alta (bona) lingvonivelo partopreni la Esperanto-eventojn kaj/aŭ movadon senlime!

Nuntempe E@I diligente laboras pri la detaloj de ĉi-speca, pure reta SES: pri ties formo, enhavo kaj la retpaĝo. Pliaj informoj aperos baldaŭ en la retpaĝo de SES kaj same en la vizaĝlibra paĝo <https://mallonge.net/SES2020>.

Ni esperas, ke vi ĝuos nian aranĝon kaj malgraŭ la pandemio ne mankos al vi la etoso de Esperantaj renkontiĝoj ĉi-somere - ni faros ĉion, por ke nia virtuala SES estu sukcesa!

Sonja Zaretskaia
SES-teamano

TRANSPORTA KONGRESO (GERMANA-POLA-FERVOJISTA) NUN EN 2021

Nova dato: 21.-24.05. (28.05.) 2021 en Frankfurt (Oder) kaj Slubice

Viruso



Ne estos surprizo por vi ke le koronaviruso devigas ankaŭ nin nove disponi. Kiel anoncote ni atendis ĝis post la paskaj ferioj antaŭ decido pri nuligo de la kongreso. Montriĝis ke multaj el la limigoj enkondukitaj en Germanio, Pollando kaj aliaj landoj pro la viruso daŭras kaj estas plilongigataj. En tiu situacio la organizantaj asocioj ne povas kun sufiĉa certeco garantii ke eblos okazigi la kongreson. Alternativa dato ĉijare estus malfacile trovebla,

krome riska. La Transporta Kongreso do **ne okazos en 2020**.

Pro la investita laboro (kaj ĉar ni daŭre pensas ke dulanda kongreso kun partopreno de IFEF estas bona ideo) ni esploris pri la eblecoj prokrasti la eventon je unu jaro ĝis la pentekostaj tagoj 2021. La kunvenejoj ankaŭ tiam estos je dispono, kaj la Fonduso por Pola-Germana Kunlaboro indikis sian pretecon ŝovi la anoncitan subvencion por nia kongreso al 2021. La temo “najbaroj” povos resti la sama. Ni ĉiuj estos unu jaron pli aĝaj, sed la Transporta Kongreso okazos!

Aliĝoj

Por la kongreso GEA, PEA kaj IFEF ricevis entute ĉ. 160 aliĝojn (la kutima “dua ondo” komence de la jaro ne venis, ĉar pro la viruso multaj jam hezitis). Ni interkonsentis trakti la ĝisnunajn aliĝojn jene:

1. Ĉiuj aliĝoj por la transporta kongreso 2020 estas konsiderataj kiel aliĝoj por 2021 kaj restas validaj. La ricevitaj kotizoj eniros la buĝeton por la Transporta Kongreso 2021.
2. Al ĉiuj kiuj deziras oni repagos la kotizon. Tio signifas malaliĝon. Sufiĉas sendi informon al: gek@esperanto.de. Por novaj aliĝoj daŭre validas gek.aligho@esperanto.de. La poŝta

adreso estas: Germana Esperanto-Asocio, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin, telefono +4930 5106 2935.

3. Ni tre dankas al ĉiuj, kiuj indikis sian pretecon kontribui al la programo. Ni kontaktos ilin aparte, sed ĉiukaze esperas ke ilia preteco validas ankaŭ por la venonta jaro.
4. Enspezoj el kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj kutime estas gravaj monfontoj por niaj asocioj. Ili grandparte mankos en 2020. Des pli bonvenaj estas donacoj - ĉu por la kongresa kaso 2021, ĉu por la ĝeneralaj kasoj de la asocioj.

Jarĉefkunveno (Federacia Kunveno) de GEA 2020

Germana Esperanto-Asocio planis organizi sian ĉijaran Federacian Kunvenon kiel kutime en la kadro de la kongreso. Invito kaj tagordo ĝustatempe aperis en la asocia revuo ("Esperanto aktuell" 2020/1, paĝo 6). Laŭ la statuto necesas havi Federacian Kunvenon unu fojon jare. La estraro decidis ke en ĉi tiu jaro la kunveno okazu en la kadro de la jam longe planita Asocia Konsilantaro (kunveno de landaj ligoj) sabaton, la 24-an de oktobro en Herzberg (Harz). La tagordo restos sama. Detaloj aperos estonte.

KASTELO GRESILLON INFORMAS

Franca Esperanto-Kultudomo en kastelo Greziljono informas vin, ke ĉiuj kursoj planitaj en julio ŝoviĝis al aŭgusto.

2020-julio-27/31 - Verda Naturisma Semajno kun INOE kaj FFN

2020-aŭg-02/09 - la Verdaj Skoltoj tendumas, skoltumas, lignokonstruas

2020-aŭg-03/13 - 6-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)

2020-aŭg-03/14 - 4-a Maratona Esperanto-kurso dum 7 ĝis 11 tagoj

2020-aŭg-10/14 - 32-a Internacia E-Konferenco post OSIEK « Naturo, Medio, Klimato, Scienco »

2020-aŭg-17/27 - 10-a Festa Semajno por infanoj, adoleskuloj kaj familioj

Aliĝoj: gresillon.org/aligho

Informoj: kastelo@gresillon.org

La teamo de Grésillon

INTERNACIA ALVOKO DE GEFASTANTOJ POR NUKLEA MALARMADO

(eltiraĵo de komunikaĵo)

Okaze de la 75-a datreveno de bombadoj de Hiroshima kaj Nagasaki, grupoj de gefastantoj manifestacios de la 6-a de aŭgusto (bombado de Hiroshima) ĝis la 9-a de aŭgusto (bombado de Nagasaki). Ili montros sian totalan opozicion al nukleaj armiloj kaj postulos iliajn detruojn. ... /...

La mondo ĉiujare elspezas 2 000 miliardojn da Eŭroj por la armado. Granda parto de tiu sumo servas por la vartado kaj la disvolviĝo de 14 000 nukleaj armiloj. Nur 9 ŝtatoj posedas tiujn 14 000 nukleajn armilojn. Malgrandega kvanto de tiuj nuklearmiloj sufiĉus por detruo la planedon. .../...

Tiu situacio devu ĉesi. Tre eta malplimulto de ŝtatoj (9/197) ne devu konstante minaci mondan ceteron. Tiuj 9 ŝtatoj devu ĉesigi la grandegajn elspezojn por teruraj armiloj. .../...

POSTULU, ke via lando subskribu la Traktaton pri la malpermeso de nukleaj armiloj.

Ĉi-sube :

La subskribintaj grupoj, la nomoj kaj retadreso de la kontaktotaj responsuloj, la lokoj de manifestacioj

- Francio: Dijon-Valduc → franca centrejo de esplorado kaj produktado de nukleaj armiloj.
retadreso: Dominique Lalanne, <do.lalanne@wanadoo.fr>

- Francio: Mont Saint-Michel
retadreso: Josette Lenoury <jlourenoury50@gmail.com>

- Francio: Brest-Ile Longue → franca submaro bazo por la nukleaj submarŝipoj.
retadreso: Chrystelle <chrystelleanvrouin@wanadoo.fr>

- Francio: Tours.
retadreso: Marie Claude Thibaud <marie-claude.thibaud@wanadoo.fr>

- Germanio: Mainz/Büchel
retadreso: Matthias-W. Engelke <distelwenk@gmail.com>

- Eburbordo: San Pedro
retadreso: Warie Yao <wariesadacrepin@gmail.com>

- Novzelando: Auckland
retadreso: Chris and Audrey van Ryn <audrey@writeaway.co.nz>

- Unuiĝinta Reĝlando: Barnstaple, Anglio
retadreso: Sheila Bloggs <blogg869@btinternet.com>

- Unuiĝinta Reĝlando: Knighton, Kimrio
retadreso: Angie Zelter <reforest@gn.apc.org>

- Unuiĝinta Reĝlando: Iona, Skotlando
retadreso: Margery Toller <margery.toller@gmail.com>

- Unuiĝinta Reĝlando: London, Anglio
retadreso: Marc Morgan <marcwmorgan@btinternet.com>

- Usono Kansas City, Misurio
retadreso: Ann Suellentrop <annsuellen@gmail.com>

Colette Weiss kaj André Weiss,
Progresema Esperantistoj

DRAMA ESPERANTO-TEATRO REVIGLIĜIS

La lasta tago en Vodnikova 9

Estis la 17a de marto 2020. Ni, membroj de Drama grupo de Studenta Esperanto-Klubo rendezuis en nia zagreba esperantejo en Vodnikova 9. La reĝisoro Lovro Krsnik kaj la nova knabo en nia teamo, Mark Fejer. (Lin proponis al ni la patrino de Jura, instruistino de Mark, kiam ŝi aŭdis ke ni bezonus lertan knabon por ludi la rolon de Petr Ginz en nia teatraĵo „Taglibro de mia frato“ de Chava Pressburger. Jura ĵus diplomiĝis pri la angla. Li en nia teatraĵo ludas la rolon de astronauto Ilan Ramon. Mark ludas en Zagreba teatro de gejunuloj rolon de ruĝĉemiza fripono en la teatraĵo de „La knaboj de Paulo-Strato. Li ŝatus en somero ekzameniĝi por eniri Akademion de drama arto kaj li volonte laboris kun nia reĝisoro, Lovro. Li volis havi plian teatran sperton, kiam li aŭdis ke ekzistas en Zagrebo ensemblo kiu preparas teatraĵon en iu nekonata lingvo nomata Esperanto.) Ni volis en julio per nia Esperanto-teatraĵo partopreni en Ĉeĥio, la lando kie mortis, la 16-jara Petr Ginz en la jaro 1944.

Kiam mi eniris, Lovro kaj Mark jam ekzercis. Mi estis lingva kontrolanto. Mark legis tre bone, mi ne devis multon korekti. Lovro instrukciis, Mark ekzercis korpmoveojn. Mi kontrolis en la mansukripto kio estos la venonta sceno kaj vidis ke tio estas la sceno en kiu Petr kun amiko flugigas la kajton. Sed la vento malhelpas ilin. (En la posta sceno venas iuj knaboj kaj ĵetos al ili ŝtonojn. (Ĉar ili komprenis ke la knaboj kun la kajto estas judoj.)

Dum Lovro ekzercis kun Mark, mi decidis kuri al vendejo kaj aĉeti kajton. Mi kredis ke estos pli facile ekzerci kun la vera kajto en la manoj ol kun la fantazia kajto. Baldaŭ mi revenis al la Esperanto-klubo. Ni iom manipulis la kajton... Kajtoj ŝatas ventojn. Do ni eliris kaj direktiĝis al la digo de la rivero Sava, kie ni flugigis nian kajton. Ĝi ekflugis. Neniu knabo ĵetis al ni ŝtonojn. Estis bele vidi ĝin liberan en la aero.

Ni volis daŭrigi la venontan semajnon.

Sed ni ne plu revenis al la kajto.

Venis la kron-viruso al Kroatio kaj malhelpis nin. Ni ne plu povas libere moviĝi, ni devas resti hejme.

La 22-an de marto 2020 je la 6.24 forta tertremo skuis Zagrebon kaj detruis ĝian malnovan centron, ĝiajn hospitalojn, katedralojn kaj muzeojn.

La stratoj estas plenaj de la kamentuboj kiujn la tertremo ĵetis de la tegmento. La Esperanta ejo en Vodnikova travivis. Ni devas en nia Esperanta domo ... konstruigi novan kamentubon. Kaj poste aĉeti novan hejtilon.

Nia kajto atendas la tempon pli favoran. Mi kredas ke ĝi flugos denove.

Laŭ Robert Milijaš, prezidanto de Studenta Esperanto-Klubo,

Spomenka Štimec

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de majo 2020

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Spomenka Štimec, Sonja Zaretskaia, Colette Weiss kaj André Weiss, Zlatko Tišljár, Teamo de Gresillon, LKK de IMEK, LKK de german-pola E-kongreso

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

